



Chapter 11

Jen Nia IJK

Introduction.....	2
Part 1 - La unua renkonto.....	2
Part 2 – Ĉe la kurspaĝaro.....	3
Part 3 – Kelkaj demandoj.....	5
Part 4 – IJK-invito.....	7
Part 5 – Planado kaj Pasporta Servo.....	9
Part 6 – Alveno kaj akceptiĝo.....	10
Part 7 – Komenco de la unua tago.....	12
Part 8 – Gardanĝeloj? Ĉu vi ŝercas?.....	14
Part 9 – Parolo kun la trinkestro.....	15
Part 10 – Gufujo.....	17
Part 11 – Enamiĝoj?.....	18
Part 12 – La lasta nokto.....	19

Introduction

In this chapter, you'll learn more new vocabulary while reading about the Esperanto youth movement.

The story follows Ina, who already speaks Esperanto, and Kabe, who has started learning the language with Ina's help. They decide to go to the IJK (International Youth Congress) where they encounter both the ordinary and the unexpected for an Esperanto youth event.

In the first three chapters, Ina and Kabe speak English, but the course dialogues appear in Esperanto. After the third chapter, they converse only in Esperanto.

The story features characters with different sexual orientations and language typical of youth that may not be appropriate for children. Discretion is advised at the request of some readers.

If you have questions or comments, you are always welcome to write to libera@ikso.net.

Part 1 - La unua renkonto

ankaŭ - also	nomo - name	aŭdi - to hear
nova - new	bruo - noise	ofte - often
danci - to dance	pravi - to be right	esti - to be
rakonto - story	ĝoji - to be glad	renkonto - meeting
ideo - idea	rilati - to relate	interesa - interesting
scii - to know	laŭta - loud	tro - too
maniero - manner	veni - to come	

- En studenta dancejo -

Kabe: Saluton!

Ina: Saluton!

Kabe: Mi estas Kabe, kiu vi estas?

Ina: Mia nomo estas Ina.

Kabe: Mi ĝojas.

Ina: Ankaŭ mi ĝojas.



Kabe: Ĉu vi ofte venas al tiu ĉi dancejo?

Ina: Ne. Ĉu vi?

Kabe: Ankaŭ ne.

Ina: Kabe estas interesa nomo...

Kabe: Ĉu? En kiu maniero?

Ina: Ĝi rilatas al Esperanto.

Kabe: Kio? Mi ne aŭdis bone. La muziko estas tro laŭta.

Ina: Mi diris, ke via nomo rilatas al Esperanto.

Kabe: Ĉu vere? Tio estas novaĵo por mi.

Ina: Ĉu vi aŭdis pri Esperanto?

Kabe: Jes, sed mi ne sciis, ke mia nomo rilatas al ĝi... Fakte, kia estas la rilato?

Ina: Ho, tio estas longa rakonto. Mi rakontos al vi poste se vi volas.
En ĉi tiu loko estas tro da bruoj.

Kabe: Jes, vi pravus. Ĉu ni dancu?

Ina: Bona ideo!

- Post kelkaj horoj -

Kabe: Dankon por agrabla vespero.

Ina: Dankon al vi. Estis vere bona. La muziko ege plaĉis al mi.

Kabe: Ankaŭ al mi. Estis tre amuze danci kun vi.

Ina: Jen mia karto, se vi volas.

Sur ĝi estas ankaŭ adreso al paĝaro kun Esperanto-kurso.

Kabe: Dankon... Mi retpoŝtos al vi.

Ina: Bone. Ĝis kaj bonan nokton!

Kabe: Ĝis la!



Part 2 – Ĉe la kurspaĝaro

ankoraŭ - still

komenco - beginning

respondo - answer

aperi - to appear

kompreni - to understand

rigardi - to look

baldaŭ - soon

legi - to read

sabato - Saturday

bedaŭri - to regret

mesaĝo - message

saĝa - wise

certa - sure

multaj - many

sed - but

devi - must	nun - now	sufiĉe - enough
diversaj - different	pardoni - to pardon	ŝajni - to seem
dum - during	paroli - to speak	tuj - immediately
ekzemplo - example	pensi - to think	tute - totally
fino - end	perfekte - perfectly	vespero - evening
for - away	povi - to be able	volonte - willingly
helpi - to help	preta - ready	jam - already
provi - to try	post - after	kelkaj - some

- Kabe aperas en la tujmesaĝilo post kelkaj tagoj-

Ina: Saluton! Ĉu vi estas tiu Kabe, kiu dancis kun mi sabatnokte?

Kabe: Sa, Ina! Jes, estas mi.

Ina: Mi ĝojas, ke vi venis al la paĝaro. Ĉu ĝi plaĉas al vi?

Kabe: Jes ja, ĝi estas tre bela kaj ŝajnas interesa :-).

Ina: Ĝi ankoraŭ ne estas tute preta, sed baldaŭ estos.

Kabe: Mi komprenas.

Ina: Sed jam estas multaj helpiloj, ekzemple vortaroj, superrigardo de la gramatiko, tujmesaĝilo kaj diversaj ekzercoj.

Kabe: Estas bona komenco...

Ina: Pardonon. Mi devas paroli kun alia persono. Mi estas ŝia 'lingvohelpanto', kaj nun ŝi volas paroli pri unu ekzerco. Mi baldaŭ revenos al vi.

- Post kelkaj minutoj -

Ina: Nun ni finparolis pri la ekzerco.

Kabe: Mi legis pri Esperanto dume.

Ina: Bone. Ĉu ĝi plaĉas al vi?

Kabe: Mi ne certas. Mi ankoraŭ ne scias sufiĉe pri la lingvo...



Ina: Saĝa respondo.

Kabe: Mi rigardos en la paĝaro kaj provos iom lerni.
Ĉu vi volas esti mia 'lingvohelpanto'?

Ina: Volonte.

Kabe: Dankon :-).

Ina: "Nedankinde, sed kisinde" :-). [Ina diras tion en Esperanto.]



Kabe: Kio? Mi ne komprenas...

Ina: Vi povas rigardi en la vortaro. Bedaŭrinde mi devas foriri de Interreto nun.
Mi revenos vespere.

Kabe: Mi pensas, ke mi estos ĉe la paĝaro tiam.

Ina: Perfekte. Do, ĝis tiam!

Kabe: Ĝis poste.

Part 3 – Kelkaj demandoj

aktiva - active	grava - important	libro - book
subite - suddenly	alia - other	havi - to have
mem - self	ŝoko - shock	almenaŭ – at least
hodiaŭ - today	movado - movement	subite - suddenly
alta - high	homo - human	nacio - nation
tamen - however	antaŭ - before	imagi - imagine
nivelo - level	teatro - theatre	aŭskulti - to listen
influi - to influence	popolo - people	temi – to relate
ĉar - because	jaro - year	preskaŭ - almost
tempo - time	demando - question	ke - that
rekomendi - to recommend	traduki - to translate	eĉ - even
kelkaj - some	sama - same	trovi - to find
ekzisti - to exist	kontenta - content	simila - similar
uzi - to use	fama - famous	kulturo - culture
simpla - simple	viro - man	fari - to do
kvanto - amount	situacio - situation	vivi - to live
forgesi - to forget	lasi - to let	skribi - to write
vojaĝi - to travel	granda - big	libera - free

- *Vespere, ankaŭ ĉe la tujmesaĝilo* -

Ina: Resaluton!

Kabe: Saluton denove.

Mi rigardis preskaŭ ĉiujn paĝojn de la paĝaro.

Ina: Bonege.

Kabe: Mi havas kelkajn demandojn. Ĉu vi havas tempon?

Ina: Jes, mi havas liberan vesperon. Do, skribu viajn demandojn. Mi provos respondi.

Kabe: Mi legis, ke Esperanto havas kulturon.

Tamen mi ne komprenas kie mi povas trovi tiun kulturon.

Ina: Vi trovos ĝin ĉie, kie estas homoj, kiuj parolas Esperanton.

Kabe: Sed neniu popolo uzas Esperanton...

Ina: Prave. Sed homoj, kiuj parolas Esperanton ofte vojaĝas kaj renkontas aliajn esperantistojn. Dum tiuj renkontiĝoj ili uzas la lingvon en plej diversaj situacioj. Do, tie vi trovos la kulturon de Esperanto.

Kabe: Bone... Ĉu ekzistas muziko, literaturo, teatraĵo ktp?

Ina: Jes, jes. Same kiel estas por aliaj lingvoj. La kvanto ne estas same granda kiel en naciaj lingvoj, sed tio ne gravas. Almenaŭ ne por mi.

Kabe: Mi komprenas...

Ina: Jen se vi volas aŭskulti kanton en Esperanto: `persone_liza_pentras_bildojn.mp3`.

- *Kabe aŭskultas la kanton* -

Kabe: Ne malbone...

Ina: Kaj vi trovos multajn librojn en Esperanto ĉe eLibrejo.

- *Kabe rigardas* -

Kabe: Sufiĉe multaj... Ĉu vi legas multe en Esperanto?

Ina: Jes, de tempo al tempo.

Se vi iam lernos la lingvon, mi rekomendos al vi kelkajn bonajn librojn.

Kabe: Dankon :-).

Kabe: Mia alia demando temas pri mia nomo... Vi diris antaŭe, ke ĝi havas rilaton al Esperanto.

Ina: Ha, jes, pri Kabe. Iam vivis viro kun la nomo Kabe. Li estis tre aktiva en la Esperanto-movado kiam ĝi estis tute nova kaj tradukis multajn librojn en Esperanton.

Kabe: Kaj tio faris lin fama?

Ina: Ne. Certe li estis unu el la plej gravaj por Esperanto tiam, kaj li multe influis la stilon de la lingvo. Tamen li subite forlasis la movadon kaj Esperanton. Mi imagas, ke estis granda



ŝoko por multaj...

Kabe: Kial li forlasis Esperanton?

Ina: Mi kredas, ke li estis malkontenta pri la esperantistoj...
Li diris ion similan al "Esperanton devas lerni la esperantistoj mem!".

Kabe: Kion li volis diri per tio?

Ina: Verŝajne, ke homoj tiam malbone parolis Esperanton...
En la jaro 1911 Kabe forlasis Esperanton. Sed mi pensas, ke hodiaŭ la lingvonivelo de la esperantistoj estas ĝenerale pli alta.

Kabe: Do mi devas bone lerni la lingvon por esti bona Kabe ;-)

Ina: Jes :-). Kaj vi devas uzi simplan stilon, ĉar tio estis tre grava por Kabe.

Kabe: Tio plaĉas al mi.

Ina: En Esperanto ekzistas eĉ vorto 'kabei', kiu signifas forlasi la movadon.

Kabe: Interese! Mi nun scias unu vorton en Esperanto, kaj verŝajne mi neniam forgesos ĝin ;-)

Part 4 – IJK-invito

afero - thing	kafo - coffee	pagi - to pay
babili - to chat	koncerto - concert	parto - part
daŭri - to continue	kongreso - congress	plani - to plan
dormi - to sleep	kosto - cost	planko - floor
eble - possibly	kotizo - fee	pluraj - several
etoso - atmosphere	ktp (kaj tiel plu) - et cetera	preni - to take
eŭro - euro	kutime - usually	problemo - problem
fajro - fire	lando - country	programo - program
fojo - time	ludi - to play	semajno - week
halti - to stop	mikso - mix	solvi - to solve
hejmo - home	mono - money	soni - to sound
inviti - to invite	montri - to show	speco - type
iri - to go	okazi - to happen	sporto - sport
juna - young	ordo - order	sukcesi - to succeed
tabelo - table	teda - boring	teo - tea
trajno - train	urbo - city	vidi - to see
vigla - alert	vojo - road	

- En kafejo, post pluraj semajnoj-

(Kabe sukcesis lerni Esperanton, kaj ili nun uzas la lingvon.)

Ina: Jen, rigardu, invitilo por IJK!

Kabe: Kio, I-J-kio?

Ina: I-J-K estas "Internacia Junulara Kongreso".
Mi planas iri al ĝi. Ĉu ankaŭ vi volas iri?

Kabe: Nu... 'kongreso' ne sonas tre interese.

Ina: Sed estas! Ne pensu pri iu teda malvigla kongreso.
Simple temas pri renkontiĝo kun junuloj de multaj landoj.
Verŝajne estos 300 ĝis 400 homoj tie, kaj preskaŭ ĉiuj parolos Esperanton.

Kabe: Sed mi ne bone parolas Esperanton.

Ina: Ne gravas, eblas partopreni en Esperanto-kursoj tie. Kutime estas du niveloj, unu por komencantoj kaj alia por homoj, kiuj jam eklernis la lingvon.

Kabe: Kutime?

Ina: Jes, kio?

Kabe: Vi diris "kutime"...

Ina: Ha, IJK okazas ĉiujare, ĉiufoje en alia lando. Pro tio ĉiu IJK estas alispeca. Sed ankaŭ estas programeroj, kiuj ofte revenas. Ekzemple, preskaŭ ĉiam eblas sportumi, kartludi, babili kun amikoj dum la tuta nokto, kanti ĉirkaŭ fajro, danci, partopreni koncertojn ktp.

Kabe: Nu, tion mi povas fari ankaŭ hejme...

Ina: Prave, sed la grava afero dum IJK estas, ke la partoprenantoj venas de multaj landoj.
Pro tiu mikso de diversaj homoj estas bona etoso, kiu tre plaĉas al mi.

Kabe: Bone. Sonas interese... Mi pripensos.

Ina: Certe.

Kabe: Tamen, problemo estas, ke mi ne havas multe da mono nun...

Ina: Mi komprenas, sed ne estus multekoste, miakrede. Jen, se vi rigardas la kotizotabelon de la IJK-invito, vi vidas, ke por vi temas pri entute nur 50 eŭroj, se ni dormos surplanke.

Kabe: Bone, tio sonas en ordo. Sed kio pri la vojaĝo...

Ina: Trajno kostus ĉirkaŭ 70 eŭrojn, ĉu tio eblus por vi?


Kabe: Espereble... Sed daŭrus sufiĉe longe per trajno...

Ina: Jes, sed ni povas halti en unu aŭ du urboj dum la vojo.

Kabe: Kaj la tranoktado? Ĉu vi pagus por ĝi?

Ina: Ne, ne mi, sed ne estas problemo.

Kabe: Ĉu vere? Kiel vi planas solvi tion?



Ina: Nu, mi baldaŭ montros al vi... Sed unue pli da teo, ĉu ankaŭ vi volas?

Kabe: Jes, dankon.

Part 5 – Planado kaj Pasporta Servo

adreso - address	koni - to know	servo - service
amaso - crowd	kontinento - continent	signifi - to mean
bezoni - to need	letero - letter	sperti - to experience
birdo - bird	loĝi - to live	ŝati - to like
bonvolu - please	mondo - world	vizo - visa
dispono - disposal	nur - only	enspezi - to earn
elspezi - spend	organizo - organisation	pasi - to pass
fakto - fact	pasporto - passport	gasto - guest
funkcii - to work	persono - person	porti - to carry
ĝusta - right	preta - ready	kapti - to catch
hotelo - hotel	rapida - fast	regiono - region
klara - clear	sako - bag	

- En la sama kafejo Ina kaj Kabe daŭrigas la planadon -

Ina: Bonvolu, jen via teo.

Kabe: Dankon. Mi dume rigardis la invitilon por IJK. Mi multon komprenas, sed ne ĉion.

Ina: Bone, bone. Nur demandu.

Kabe: Jen la aferoj, kiuj estas malklaraj por mi: aliĝilo, TEJO, pepo kaj amasloĝejo.

Ina: Aliĝilo estas ilo por al-iĝi, en kiun vi skribas vian nomon, adreson ktp. TEJO estas mallongigo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Pepo estas la amuza birdo de TEJO. Amasloĝejo estas ejo, kie amaso da homoj loĝas, kutime oni bezonas tie dormsakon.

Kabe: Hmm, vi klarigis tro rapide. Mi ne kaptis ĉion...

Ina: Mi pensas, ke ne tre gravas nun. Poste ni povas paroli pli pri la IJK-invitulo.

Kabe: Do, vi volas plani la vojaĝon nun, ĉu?

Ina: Jes, volonte. Tiel vi vidos, ke la vojaĝo ne kostos tiom multe.

Kabe: Mi scivolas pri kiel vi solvos la tranoktadon, ĉar mi ne havas monon por hotelo aŭ junulargastejo.

Ina: Jen la solvo! Libreto kun la nomo "Pasporta Servo".

Kabe: Servo por kio?

Ina: Por homoj kiel ni... Kiuj ŝatas vojaĝi kaj sperti landojn sen elspezi multe da mono.

Kabe: Bone... kaj kiel funkcias tiu servo? Mi vidas, ke en la libreto estas multe da adresoj de pluraj landoj.

Ina: Ĝuste. Fakte ili ĉiuj estas je via dispono!

Kabe: "Je via dispono", kion signifas tio?

Ina: Signifas, ke homoj ĉe tiuj adresoj pretas gastigi vin kaj helpi vin konatiĝi kun ilia regiono.

Kabe: Sonas interese... Do, oni loĝas en la hejmo de aliaj esperantistoj, ĉu?

Ina: Prave, mi havis plurajn interesajn spertojn per Pasporta Servo... Mi uzis ĝin en tri kontinentoj kaj ĝis nun funkciis tre bone.

Kabe: Bonege, kien ni iru?

Ina: Do, mia plano estas, ke ni...

Part 6 – Alveno kaj akceptiĝo

afabla - kind

lesbo - lesbian

mapo - map

akcepti - to accept

manĝi - to eat

amiko - friend

aspekti - to look

membro - member

paŭzo - break

budo - booth

memori - remember

dubi - to doubt

flago - flag

preferi - to prefer

sata - full

horo - hour

ruĝa - red

informo - information

knabo - boy

sekso - sex

kredi - to believe

konsenti - to agree

sukcesa - successful

ŝildo - sign

kvitanco - receipt

teksto - text

vico - queue

labori - to work

timi - to fear

laca - tired

(LKK = Loka Kongresa Komitato = Grupo da homoj kiuj aranĝas kongreson.)

- Ina kaj Kabe alvenas post sukcesa vojaĝo kaj uzado de Pasporta Servo en du urboj.-

Kabe: Jen, vidu, tie estas granda Esperanto-flago.

Ina: Jes, kaj sub ĝi estas ŝildo kun la teksto "Bonvenon al IJK!". Hu ra! Ni do finfine alvenis.

Kabe: Jes... Mi estas tre laca kaj malsata...
Ĉu vi pensas, ke ni povas tuj ion manĝi?

Ina: Mi dubas pri tio... Unue ni devas akceptiĝi ĉe la akceptejo, kaj tio povas daŭri longe, miasperte.

Kabe: Ho ve! Ĉu tio estas la vico por la akceptejo?

Ina: Mi timas, ke jes. Ne estas tute perfekte alveni vespere... Sed ni povas babili kun homoj en la vico. Jen, mi vidas amikon de Rusio! Saluton, Katja!!!

Kabe: Mi estas malsata, mi volas manĝi.
Post ĉirkaŭ 2 horoj en la vico kun novaj kaj malnovaj amikoj

LKK: Bonvenon, kiu vi estas? De kiu lando? Ĉu vi antaŭpagis? Se jes, bonvolu montri la kvitancon. Ĉu vi estas TEJO-membro? Se ne, vi povas membriĝi ĉe la venonta budo.

Ina: Jen kvitancoj de antaŭpagoj, membrokartoj kaj niaj pasportoj.

LKK: Tre bone. Do, mi vidas, ke vi loĝos en amasloĝejo kaj manĝos en la junulargastejo. Ĉu ĝustas tiuj informoj?

Kabe: Jes.

LKK: Perfekte. Vi povas pagi kaj ricevi sakon kun programo, mapo ktp. ĉe la ruĝa budo, tie.

Ina: Bone, dankon.

Kabe: Tiuj personoj vere aspektis lacaj... Kaj ne estis tre afablaj.

Ina: Vi pravas, sed memoru, ke la LKK laboras jam dum eble ok horoj sen multe da paŭzoj. Mi certas, ke ili estos pli afablaj kaj babilemaj dum la semajno.

Kabe: Bone. Nun ni trovu la amasloĝejon, kaj poste mi ŝatus ion manĝi...

Ina: Ĉu vi vidis la knabinon ĉe la TEJO-budo?

Kabe: Jes, kio pri ŝi? Ĉu vi konas ŝin?

Ina: Bedaŭrinde ne... Sed ŝi estas ege bela, ĉu ne?

Kabe: Mi konsentas, tamen ne bone komprenas...
Ĉu al vi plaĉas inoj?

Ina: Jes... Mi volis diri al vi antaŭe, sed ial ne faris.
Virinoj plaĉas al mi pli ol viroj aspekte ktp.

Kabe: Ĉu – ĉu vi estas...?



Ina: Jes, mi estas samseksemulo. Oni povas diri ankaŭ lesbo.

Kabe: Bone... Mi tute ne sciis... Sed mi ĝojas, ke vi diris. Fakte mi ĝojas ankaŭ pri tio ke vi estas samseksemulo. Vi estas la plej afabla kaj agrabla lesbo, kiun mi konas!

Ina: Dankon. Ĉu vi konas aliajn?

Kabe: Ne.

Ina: Sed kiel vi scias tion?

Kabe: Fakte... Ĉiukaze mi kredas, ke tiu bela knabino, pri kiu vi parolis, preferas virojn!

Ina: Ni vidos...

Part 7 – Komenco de la unua tago

apenaŭ - barely

konstrui - to build

profunda - deep

dekstra - right

krei - to create

rekto - straight

domo - house

mateno - morning

ronki - to snore

evidente - obviously

metro - metre

sendi - to send

feki - to poo

minuto - minute

supozi - to assume

fermi - to close

nervoza - nervous

ŝtopi - to plug

flanko - side

orelo - ear

telefono - telephone

flava - yellow

poŝo - pocket

trafi - to hit

ĝeno - bother

prelego - lecture

viziti - to visit

karesi - to pet

prezenti - to present

prezidi - to chair

kompati - to pity

- En la amasloĝejo-

Ina: Bonan matenon!

Kabe: Eheeee.

Ina: Ĉu vi bone dormis?


Kabe: Male. Mi apenaŭ dormis...

Ina: Sed kial? Eble vi estis nervoza pri via unua IJK-tago?

Kabe: Ne vere. Simple iu tre laŭte ronkis la tutan nokton, kaj tio ege ĝenis min.

Ĉu vi ne aŭdis tion?

Ina: Tute ne, mi profunde dormis. Ĉu mi forĝesis diri al vi, ke indas uzi orelŝtopilojn kiam vi dormas en amasloĝejo?



Kabe: Evidente jes...

Ina: Ho, kompatinda Kaĉjo!

Kabe: Pri kiu vi parolas?

Ina: Pri vi. Per -ĉj- eblas krei virajn karesnomojn en Esperanto.

Kabe: Ha, jes, mi iam legis pri tio. Kaj vi do estus I-nj-o?

Ina: Se vi volas.

Kabe: Kioma horo estas nun?

Ina: Jam estas kvin minutoj antaŭ la deka, aŭ naŭa kvindek kvin.
Vi maltrafis la matenmanĝon...

Kabe: O, fek'! Kaj mi, kiu estas ege malsata.

Ina: Se vi hastos, vi povas almenaŭ trafi la malfermon de la kongreso.

Kabe: Kiam ĝi estos?

Ina: Je kvarono post la deka. Ĝi daŭros horon. Kaj je la dek-dua eblos manĝi.

Kabe: Bele. Mi antaŭĝojas. Diru, kio okazas dum la malfermo? Ĉu ĝi estas vizitinda entute?

Ina: Laŭ mi jes. Kutime ĝi ne estas tre vigla, sed por vi, kiel 'novulo', povus esti interesa. Mi supozas, ke la prezidanto de TEJO diros kelkajn vortojn. Iu de LKK verŝajne prezentos la temon de la kongreso. Ĉiu IJK havas sian temon. Mi esperas, ke ankaŭ estos iom da muziko.

Kabe: Bone, kie ĝi okazos?

Ina: En la granda prelegejo.

Kabe: Kiel trovi tiun?

Ina: Kiam vi eliras tiun ĉi ejon, iru dekstren ĝis la fino de la konstruaĵo, dekstren denove, rekten dum eble 100 metroj, kaj estas flava domo je la maldekstra flanko de la vojo. En ĝi vi trovos ŝildojn pri ĉiuj ejoj de IJK.

Kabe: Dankon... Mi sendos mesaĝon per poŝtelefono, se mi ne trovos.

Ina: Ha, bona ideo. Ĝis tie!

Kabe: Ĉaŭ!

Part 8 – Gardanĝeloj? Ĉu vi ŝercas?

agi - to act	miri - to be amazed	lasta - last
anĝelo - angel	papero - paper	propono - proposal
ĉambro - room	preĝi - to pray	ĉefa - main
ĉielo - sky	resti - to stay	sidi - to sit
deziri - to desire	serioza - serious	doni - to give
frukto - fruit	strukturo - structure	tasko - estimate
gardi - to keep	ŝerco - search	ja - indeed
kontakto - contact	veka - awake	koro - heart
voki - to call		

- En la prelegejo -

Prezidanto de TEJO:

Fine mi deziras al vi ĉiuj, kaj laŭ la lastaj informoj ni estas 423 ĉi tie de 38 landoj, fruktodonan kaj amuzegan IJK-semajnon! Koran bonvenon nome de la TEJO-estraro.

- Post granda aplaŭdo -

Ina: Ĉu vi sukcesis resti veka?

Kabe: Jes, ĉefe pro mia malsato... ne, mi ŝercas.

Estis interese aŭdi iom pri la agado kaj strukturo de la movado.

Ina: Eble iu el la TEJO-kunsidoj povas interesi vin...

Kabe: Jes, eble. Mi provos iun tagon ĉeesti unu por vidi.

Sed kio estas tio pri "gardanĝelo"? Ĉu iu malbona ŝerco?

Ina: Ŝajnas, ke vi tamen iom dormetis... Ili ja klarigis, ke temas pri homoj, kiuj jam havas multe da IJK-spertoj kaj pretas helpi al IJK-novuloj. Do, la nomo "gardanĝelo" estas ŝerca, sed la ideo estas serioza kaj bona, mia opinie.

Kabe: Kaj kiel kontakti tiujn anĝelojn? Per iu IJK-preĝo eble...

Ina: Provu! Se ne funkcias, vi povas iri al la ĉambro "La ĉielo" post la tagmanĝo.

Kabe: Bonege, unue manĝo, poste ĉielen al la anĝelinoj.



- Post iom maltro da manĝo, Kabe iras al la ĉambro "La ĉielo" -

Jesi: Saluton. Ĉu estas via unua IJK?

Kabe: Jes. Saluton.

Jesi: Bone. Tiu ĉi estas jam mia sesa IJK kaj mi nomiĝas Jesi.

Kabe: Mia nomo estas Kabe.

Jesi: Kabe, bone ke vi ankoraŭ ne kabeis! Haha.

Jen estas papero kun kelkaj demandoj kaj taskoj rilate al la kongreso. Mi proponas, ke vi kun Ana de Pollando, Boris de Germanio kaj Nacuko de Japanio provu solvi ilin. Nur voku min, se vi bezonos helpon.

Kabe: Bone... dankon.

- Poste en la libroservo -

Ina: Kiel do estis en la ĉielo?

Kabe: Ĉielece...

Mi pensas, ke mi fakte renkontis veran anĝelinon! Mirinde bela kaj afabla ŝi estis...

Ina: Ho, Dio mia! Kaj kio estas ŝia nomo?

Kabe: Aj, mi jam forgesis!



Part 9 – Parolo kun la trinkejestro

biero - beer

peti - to ask

elekto - electricity

ebria - drunk

praktike - practically

rondo - circle

facila - easy

sana - healthy

stranga - strange

fajfi - whistle

sola - alone

gufo - owl

je via sano - to your health

ŝanĝo - change

trinki - to drink

kara - dear

trankvila - calm

kiso - kiss

konstanta - constant

viando - meat

koridoro - corridor

vodko - vodka

estro - boss

trinkejestro - bartender

- En la trinkejo Kabe parolas kun la trinkejestro -



Kabe: Unu bieron, mi petas.

Estro: Ĝi kostas 1 eŭron. Ĉu vi ŝatus ankaŭ ion alian?

Kabe: Ne, dankon, biero sufiĉas por mi.

Estro: Ĉu vere? Kio pri vodko, labambo kaj inoj?

Kabe: Nu, kial ne...

Mi ankoraŭ ne dancis labambon, sed laŭdire ĝi estas amuza.

Estro: Funkcias tiel, ke dum la kantaĵo "La Bamba" homoj dancas en granda rondo, kaj ene de tiu rondo dancas aliaj homoj. Tiuj dancantaj ene de la rondo elektas dancanton de la rondo kaj kisas ŝin aŭ lin trifoje sur la vangoj, poste ili ŝanĝas lokon kaj la kisito iĝas kisono. La kisono nun estas kisoto. Tre facile, ĉu ne?

Kabe: Nu, mi esperas, ke estas pli facile en la praktiko... Mi provos iam, sed unue la bieron!

Estro: Saĝa knabo.

Kabe: Vi, kiu konas preskaŭ ĉiujn ĉi tie, ĉu vi scias, kiu estas la knabino, kiu kunordigis la "gardanĝelojn"?

Estro: Vi verŝajne pensas pri Jesi...

Kabe: Jes, ĝuste! Nun mi memoras, ke mi aŭdis ŝian nomon.

Estro: Laŭ mi ŝi estas stranga persono. Tute ne trinkas bieron kaj ne manĝas viandon. Ŝajnas, ke ŝia sola intereso estas Esperanto-agado.

Kabe: Sed ŝi estas tre bela kaj afabla laŭ mi...

Estro: Eble vi pravus pri tio... Ŝi preskaŭ neniam estas en la trinkejo, kaj mi do ne renkontas ŝin ofte. Fakte, mi tute fajfas pri tiaj homoj!

Kabe: Mi komprenas... Tiel parolas vera trinkejestro!

Estro: Prave. Je via sano!

Kabe: Je via sano! Mmmm, bonega biero.

Estro: Kompreneble. Estis ja mi, kiu elektis ĝin.

Kabe: Amiko, ĉu vi havas ideon kie eblas trovi tiun strangan sed tre belan knabinon?

Estro: Tutcerte en la Gufujo. Tiaj homoj konstante sidas tie teumante. Kiel teda vivo!

Kabe: Gufujo?

Estro: Guf-uj-o. Estas trankvila ejo kie eblas trinki teon, babili, aŭskulti trankvilan muzikon kaj simile. Vi trovos ĝin fine de la koridoro ekster la trinkejo. Sed vi ne povas porti vian bieron tien! Vere estas ujo de gufoj!

Kabe: Bone, dankon... Eble mi iru al la dancejo unue.

Estro: La venonta persono! Kion vi volas, kara?

Part 10 – Gufujo

afiŝo - sign	feminismo - feminism	oficiala - official
akvo - water	festivalo - festival	pendi - to hang
arto - art	fondi - to found	popo - pop music
atendi - to wait	forta - strong	rajto - right
bando - band	forumo - forum	reprezenti - to represent
biciklo - bicycle	gitaro - guitar	sekcio - section
cetere - moreover	gvidi - to guide	seminario - seminar
diskuti - to discuss	instanco - authority	sento - feeling
ekskurso - excursion	kampo - field	streĉi - to stretch
ekspozicio - exposition	karavano - caravan	titolo - title
ekvilibro - balance	kontrasto - contrast	ttt (tut-tera teksaĵo) - web, WWW
eventuale - possibly	moderna - modern	vasta - vast
fali - to fall	morgaŭ - tomorrow	

- En la Gufujo -

Jesi: Ĉu estas libera loko?

Ina: Jes, certe.

Jesi: Tre agrable ĉi tie en la gufujo. Mi bezonas iom da trankvilo post tre streĉa tago.

Ina: Mi komprenas.

La etoso en gufujo estas tre bona kontrasto al la aliaj okazaĵoj dum IJK, ĉu ne?

Jesi: Jes. Mallaŭta muziko, trankvila babilado kaj iu interesa teo. Perfekte por rehavi fortojn...

Ina: Vi ŝajnas ege laca. Kion vi faris dum la tuta tago?

Jesi: Unue mi faris afiŝon por la morgaŭaj ekskursoj. Cetere, ĉu vi iros al iu ekskurso?

Ina: Jes, al la granda akvofalo kaj poste al ekspozicio pri moderna arto.

Jesi: Bona elekto. Ankaŭ mi iros tien. Ĉiukaze, post la pendigado de la ekskursafiŝoj mi gvidis diskutrondon kun la titolo 'Ĉu feminismo samas en diversaj landoj?'. Estis tre interesa kaj vigla diskuto. Kaj dum la lastaj kvin horoj mi estis en longa komitatkunsido. Vere estis tro longa, sed nun la komitato finkunsidis.

Ina: Ha, vi do estas komitatano?

Jesi: Jes, kaj mi ankaŭ estas en la estraro de TEJO.

Ina: Mi neniam estis tre aktiva en la movado... Fakte kio estas la ĉefa agado de TEJO nun?

Jesi: Ĝi estas vasta. En plej diversaj kampoj ni havas agadon, ekzemple semInarioj pri homaj rajtoj kaj interkulturaj rilatoj, biciklkaravanoj, lingvaj festivaloj, konstruado de ttt-paĝoj ktp. Ni ankaŭ estas reprezentitaj en diversaj oficialaj instancoj kiel Forumo Junulara Eŭropa, UNESKO kaj la junulara sekcio de Unuiĝintaj Nacioj.

Ina: Sonas interese. Tamen por mi sufiĉas esperantumi unu aŭ du semajnojn jare.

Jesi: Jes, oni trovu sian ekvilibron... Ĝuste nun mi sentas, ke estas tro da Esperanto en mia vivo... Ĉu vi estas membro de iu alia organizo?

Ina: Ne vere organizo, sed mi ludas gitaron en bando.

Jesi: Bele! Mi tre ŝatas kanti. Kian muzikon vi ludas?

Ina: Nu, estas simpla popo. Ni ĵus fondis la bandon, sed eventuale ni ludos dum la venonta IJK...

Jesi: Mi jam antaŭĝojas!
Nur diru, se vi bezonas iun helpkantiston.

Ina: Kial ne?! Eble vi volas kanti ion nun, kaj mi povas ludi gitaron?

Jesi: Jes, mi ŝatus tion.

Ina: Tre bone, mi tuj alportos mian gitaron.

Jesi: Mi atendas vian espereble rapidan revenon...



Part 11 – Enamiĝoj?

amo - love

feliĉo - happiness

bati - to hit

flirto - flirting

buŝo - mouth

radii - to beam

enamiĝo - falling in love speciala - special

- Du tagojn poste, ekster la dancejo -

Ina: Ej, Kabe, vi aspektas feliĉega.

Kabe: Jes, mi estas!

Ina: Bele. Mi ĝojas! Ĉu la kongreso tiom plaĉas al vi?

Kabe: Jes kaj ne... Certe mi tre kontentas pri IJK, sed estas io alia, kio feliĉigas min. Pli ĝuste dirite, estas iu, kiu batigas mian koron.

Ina: Diru, diru, ĉu vi enamiĝis al iu knabino?

Kabe: Mi ne certas, ĉu mi jam enamiĝis, sed sentiĝas tre bone... Ŝi eĉ kisis min sur la buŝon dum

labambo. Mirinde kian kison ŝi donis...

Ina: Bonege! Nun mi komprenas kial vi elradias tiom da ĝojo. Fakte, io simila okazis al mi...

Kabe: Sed mi pensis, ke vi ne ŝatas labambumi.

Ina: Prave. Ne okazis en la dancejo, sed en la Gufujo.
Kaj ne estis kiso, sed tamen io tre ĝojiga...

Kabe: Do, rakontu!

Ina: Mi ne scias kion diri vere...
Nenio speciala okazis, almenaŭ ankoraŭ ne okazis.
Sed mi iel sentis, ke ŝi tre ŝatas min kaj mi ŝin.
Ni longe babilis pri muziko kaj poste kantis kune...
Mi pensas, ke ŝi flirtumis kun mi, estis tre agrable.

Kabe: "Malfeke!", kiel diras via amiko de Kanado.

Ina: Jes, vere! Mi esperas renkonti ŝin baldaŭ denove.

Kabe: Same mi...



Parto 12 – La lasta nokto

ambaŭ - both

privata - private

damne - damn

proksima - close

desegni – to draw

ridi – to laugh

impreso - impression

sablo - sand

komplike - complicated

sekundo - second

konfuzo - confusion

signo - sign

lago - lake

stato - state

momento - moment

vizaĝo - face

plena - full

- Ĉe lago proksime de la kongresejo -

Kabe: Ho, ankaŭ vi estas ĉi tie!?

Ina: Jes, mi renkontos amikon ĉi tie baldaŭ,
por privata interparolo. Do, mi ŝatus peti vin foriri.

Kabe: Nu, tio ne eblas. Tute ne eblas, fakte.

Ina: Kial? Tiu ĉi renkonto estas tre grava por mi. Do, bonvolu lasi min sola.

Kabe: Kiel mi ĵus diris, tio ne eblas. Ĉar ankaŭ amiko de mi baldaŭ aperos ĉi tie.

Ina: Damne. Tipe, ke ĝuste nun...

Fakte temas pri la knabino, pri kiu mi rakontis. Ŝia nomo estas Jesi, cetere.

- Jesi aperas -



Jesi: Karaj! Bonege, ke vi povis veni, mi tiom ĝojas vidi vin denove!
Sed... vi aspaktas ŝokitaj kaj iel konfuzitaj...

Kabe: Evidente...

Jesi: Do, mi supozas, ke vi jam ekkomprenis kiel statas, ĉu?

Ina: Mi nenion komprenas!

Kabe: Mi pensas, ke mi ne volas kompreni...

Jesi: Sed ne estas komplike! Lasu al mi klarigi.
Kiam Ina rakontis al mi pri sia amiko, kiu lernis
Esperanton tre rapide kaj nomiĝas Kabe, mi kaptis, ke vi du jam konas unu la alian.

Ina: Jes, sed...

Jesi: Sed kio?

Kabe: Ni ambaŭ havis la impreson, ke vi flirtumis kun ni kaj...

Jesi: Tute prave! Pro tio mi volis paroli kun vi ambaŭ nun. Aŭskultu, mi petas. Mi ofte tre ŝatas plurajn personojn samtempe, ne gravas, ĉu estas viro aŭ virino. Kaj dum IJK okazis, ke mi enamiĝis al vi ambaŭ!

Kabe: Kaj ŝajne ni ambaŭ al vi...

Ina: Momenton, mi estas tiom laca, ke mi apenaŭ povas pensi. Ĉu mi ĝuste komprenis, ke...

Jesi: Jeees! Vidu:

Jesi kun ĝojplena vizaĝo desegnis grandan koron en la sablo kaj skribis en ĝi "I + J + K".

Kabe post sekunda pripensado diris "Jen nia IJK" kaj ili ĉiuj ekridis!



- Fino -